Fervojbileto

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Fervojbileton mi aĉetos,
Veturos serĉi vin.
Gravajn aferojn mi forĵetos,
gravajn aferojn mi forĵetos.
Liberos fine, liberos fine.

Gitaron mi nenovan prenos,
Malnovan kantareton.
De revoj kaj esperoj plena,
de revoj kaj esperoj plena,
Vojon impetos, vojon impetos.

Ĉiutagecon mi forgesos,
Forlasos landon ĝian.
Sed kio baldaŭ min atendos,
sed kio baldaŭ min atendos
neniu scias, neniu scias.

Sub akompan' de trajnaj radoj
por vi komponos kantojn.
Mallaŭte sonos ili arde,
mallaŭte sonos ili arde
en nokta lando, en nokta lando.

Mia vojaĝo estas longa
De vojo mi laciĝos.
Revenos hejmen mi volonte,
revenos hejmen mi volonte
kaj trankviliĝos, kaj trankviliĝos.
Ĉis la somer', somer Estonta.
Kaj trankviliĝos, kaj trankviliĝos.
Ĉis la somer', somer Estonta.